

Sud-Rejna Kuriero

Majo
2016

Komuna inform-bulteno de Esperanto-Societo Basel kaj Mulhouse-Esperanto

N°62

Espace 110
FR-68110 ILLZACH
CCP 19684 F Strasbourg
mulhouse.esperanto11@free.fr



Esperanto Societo Basel
Postfach 178
CH-4005 Basel
esperantobasel@gmx.ch

Karaj membroj, karaj gesamideanoj, karaj legantoj,

En februaro okazis nia Ĝenerala Membro-Kunveno. Detale raportas pri ĝi Ivo.

Lucien Hodapp donacis al nia grupo plurajn siajn Esperanto-librojn. Ni legu pri lia nova situacio.

Pluraj el ni konis nian samideanon Carlo Nicolodi el Allschwil. Dank'al Edmond aperis la libro pri li ankaŭ en Esperanto "De Karlis al Carlo".

En marto belis la vetero ĉe la Mediteranea mar-bordo okaze de agrabla Esperanto-semajno.

En aprilo Roberto ĝuis la viziton al Irano, kaj rakontas pri tiu ekzotika aventuro.

Preskaŭ samtempe okazis nia regiona staĝo en Art sur Meurthe en amika, instruiga kaj amuza etoso.

Daŭre okazas "Verdaj Fadenoj", sed jen en nova loko. Ili daŭros ĝis fino de junio.

Jen invito al amika tago de la frajburga grupo, ni kune ĝuu agrablan tagon sur la Nigra Arbaro.

Pri nia jarfina komuna manĝo ni ankoraŭ kune decidis pri la loko kaj tago.



André Grossmann

Ĵaŭde	19.05.2016	Je la 18a horo Monata kunveno : Grün 80
Lunde	27.06.2016	Verda fadeno en la restoracio: "Hotel-Restaurant Porte de France", 94 avenue de Bâle, Saint-Louis, proksime al la svisa landlimo.
FERIOJ		
Ĵaŭde	22.09.2016	Monata kunveno : Aktuala temo
Lunde	31.10.2016	Verda fadeno en la restoracio: "Hotel-Restaurant Porte de France", en Saint-Louis.
Ĵaŭde	24.11.2016	Monata kunveno : Programo
Sabate	10.12.2016	Zamenhofa-Festo en Francio supozeble en Colmar

Nicole Bérout

Rigardo al la Svisa Esperanto-kalendaro

En la Svisa Kalendaro vi trovas la informojn pri la aktualaj Esperanto-eventoj kaj renkontiĝoj, kiuj okazas en aŭ proksime de Svislando aŭ tradicie okazas kun svisa partopreno. Se vi volas aperigi eventon en nia kalendaro, sendu ĝin al SES-informas - kalendaro redakto.

(Atentu: La Svisa Kalendaro estas servo por la Esperanto-aktivuloj en Svislando fare de Svisa Esperanto-Societo. Svisa Esperanto-Societo tamen ne respondecas pri la ekzakteco kaj kompleteco por la informoj donitaj en la Svisa Kalendaro, tiuj informoj devenas de la organizantoj de la koncernaj eventoj kaj estas sub ties sola respondecado. Svisa Esperanto-Societo respondecas nur pri eventoj, kiujn ĝi mem organizas aŭ kiuj okazas sub ĝia aŭspicio. La fakto, ke evento estas publikigita en la Svisa Kalendaro, ne signifas, ke SES havas iun ajn rilaton kun la evento aŭ la organizantoj. Pri la enhavo de retpaĝoj, al kiuj la ligiloj de tiu-ĉi kalendaro kondukas unike respondecas ties redaktantoj.)

(Laste aktualigita, la 13-an de aprilo 2016)

Junio 2016

4-an de majo ĝis 6-a de junio 2016, ĉiutage ek de la 17a, Bielo, Vielle Courronne, Place de l'Eglise: **Eta tablo de la mond-registaro kadre de la artekspozicio „Joli mois de mai” (Beleta monato de majo) kun Parzival**

1-an de junio 2016, 18h: renkontiĝo stacidomo Wil SG: **Je bona vetero pikniko apud la Turo de Wil/je malbona vetero kunveno en la hejmo de Barbara Pochanke**

6-an de junio, 18h, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: **Babila grupo, kiu ĉefe celas komen-cantojn**

11-an de junio 2016, Laŭzano: **Jara ekskurso** (informoj sekvos)

13-an de junio, 18h, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: **Babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn**

18-an de junio 2016, 10h: La Chaux-de-Fonds, CDELI, Urba Biblioteko: **Studsabato de CDELI**

20-an de junio, 18h, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: **Babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn**

27-an de junio, 18h, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: **Babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn**

27-an de junio, 19h, en la restoracio "Hotel-Restaurant Porte de France", 94 avenue de Bâle en Saint-Louis (en Francio rekte apud Bazelo): **Verda Faden (Esperanto-Societoj Bazelo kaj Mulhouse)**

30-an de junio 2016, 20h00. Zuriko en Kafejo Mandarin (apud Stacidomo Stadelhofen): **Libera kunveno kaj kafoklaĉo**

Julio 2016

2-an de julio 2016, 10h00: **Hirzel, Johanna-Spyri-Muzeo: Orientsvisa Regiona Kulturrenkontiĝo kaj inaŭguro de la libro „Heidi povas apliki, kion ŝi lernis**

16-an ĝis 23-a de julio 2016, Vroclavo, Pollando: **72-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO**

16-an ĝis 23-a de julio 2016, Nitra, Slovakio: **69-a Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista**

23-an ĝis 30-a de julio 2016, Nitra, Slovakio: **101-a Universala Kongreso de Esperanto**

30-an de julio ĝis 6-a de aŭgusto 2016, Nyíregyháza, Hungario: **49-a Konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**

Septembro 2016

5-an de septembro 2016, 20h00, Laŭzano, Espace Dickens, Rue Dickens 6: **Temo decidota**

7-an de septembro 2016, 19h00: Flawil en b'treff (apud la stacidomo Flawil): **La membroj de la Esperanto-Klubo Wil rakontas pri siaj kongresaj travivaĵoj.**

16-an ĝis 18-a de septembro 2016: Gîte du Cerneux Billard (Francio, rekte apud la svisa landlimo): **9-a SFERO (Svisa Familia kaj Feria Esperanto-Renkontiĝo)**

24-an de septembro 2016, 10h00: La Chaux-de-Fonds, CDELI, Urba Biblioteko: **Studsabato de CDELI**

Sabate la 11-an de junio 2016

Jara ekskurso de la Laŭzana Esperanto-Societo

Ĉi-jare, ni malkovros la novan muzeon ...

"Chaplin-a Mondo"

Ni proponas iri trajne, ĉar la parkejo de la muzeo estas malgranda.

Rendevuo antaŭ la stacidomo de Vevey, je la 9:45. De tie, ni iros kune per buso ĝis la muzeo Chaplin (buslineo 212).

Surloke : privata gvidata vizito - franclingve -, ĉirkaŭ 2 horoj kaj ni tagmangos en la restoracio de la muzeo.

Prezo por eniro, vizito, tagmanĝo : CHF 60. (sen trinkaĵoj).

La membroj de aliaj Svisaj Esperanto-Kluboj estos bonvenaj !

Bonvolu aliĝi nepre antaŭ la 30-a de majo pagante la sumon al la konto de LES ce CCP 10-26785-8 (Laŭzana Esperanto-Societo) kun mencio "jara ekskurso".

Por la aktivaj membroj de LES : CHF 45.



El Vikipedio

Charles Spencer "Charlie" CHAPLIN (naskiĝis la 16-an de aprilo 1889 en Londono, mortis la 1977 en Vevey, Svislando) estis brita reĝisoro, produktoro, aktoro, scenaristo kaj humoristo.

Kiel aktoro Chaplin plej ofte ludis la rolon de persono apartenanta al malsupra sociala tavolo, kiu ruze defendas sian pozicion kontraŭ riĉuloj kaj potenculoj.

Charlie Chaplin estis unu el la plej kreivaj homoj de la epoko de la muta kino. Li ne nur reĝisoris, verkis scenarojn, produktis filmojn, sed ankaŭ mem muntis ilin kaj komponis la muzikon de siaj filmoj. Lia kariero daŭris dum pli ol sesdek kvin jaroj de kabaretoj en Anglio ĝis lia morto en Vevey, Svislando.


Jen kortuŝa rakonto pri la travivaĵoj de Carlo Nicolodi, en malfacila periodo, kiam en Eŭropo furiozis la dua mondmilito.

Lia patro Arturo, itala esperantisto, kaj Vera, latva esperantistino, ja konatiĝis koresponde pere de Esperanto kaj geedziĝis en Italio, sed la Dua Mond-milito ilin disigis kaj ilia bebo Carlo iĝis Kārlis en Latvio, dum la patro estis malliberulo en nazia lagero. Nur plurajn jarojn post la milito Kārlis iĝis denove Carlo en Italio. Sekvis plenkreskula vivo en Germanio kaj Svislando.

La edzino de Carlo, Anne-Lise Nicolodi-Nielsen, danino kaj esperantistino, iniciatis la eldonadon de tiu libro en la germana kaj dana lingvoj.

Tiam Edmond Ludwig leginte la libron tuj ekhavis la emon ĝin traduki al Esperanto.

Tial ni nun povas proponi al vi la Esperanto-version de tiu libro eldonita de la asocio Esperanto-France-Est.



La libro estas mendebla ĉe:
André Grossmann,
5, rue des Pyrénées
68390 BALDERSHEIM

Mulhouse Esperanto
CCP 19684 F Strasbourg

92-paĝa libro je 11 €
Afranko

en Francio	2,80 €
al Eŭropo	1 €

Ĝenerala Asembleo de Mulhouse-Esperanto februaro 2016

La ĝenerala asembleo okazis en Espace 110 la 5an de februaro 2015 je 18h30.

Ĉeestantoj: André Grossmann, Roberto Kueny, Edmond Ludwig, Jacques Pineda, Yves Stutz, Anne Vernet.

Andreo malfermis la kunvenon.

Akcepto de la lasta raporto.

Legado de la agad-raporton (fare de la sekretario) de la jaro 2015. Unuanima akcepto de la raporto.

La kasisto prezentis la financon raporton. Unuanima akcepto.

Renovigo de la komitato:

Finiĝis la mandatoj de: Robert Kueny
Jacques Pineda
Yves Stutz

La tri membroj estis unanime reelektitaj.

Prezento de la listo de la asocia-membroj.

La komitato konsistas nun el:

Prezidanto:	André Grossmann
Sekretario por la franca:	Robert Kueny
Sekretario por Esperanto:	Yves Stutz
Kasisto:	André Grossmann
Eksteraj rilatoj kaj propagando:	Jacques Pineda
kaj	Simone Kiry
Asesoroj:	Alexandra Mussabini, Alain Sarrasin, Anne Vernet, Bertrand Wick.

Parolado pri la statuto kaj la raporto por la tribunalo.

Kurso por komencantoj kaj progresantoj:

Nuntempe ni havas 1 komencanton kaj 2 progresantojn.

Verda fadeno: en **St Louis**, la Café de la Poste estas tro brua. Anne klopodos por trovi novan lokon. En **Mulhouse** la Café du Printemps baldaŭ fermiĝos. Ni povus iri al restoracio en Sausheim, sed en alia tago ol lunde. Jacques klopodos por trovi lokon en Mulhouse mem.

SRK regule aperis.

Ekde la unua de januaro la poŝtaj tarifoj altiĝis. Por Francio necesas nun afranki 50-gr sendaĵon je 1,36 eŭroj anstataŭ je 1,05 eŭroj. Por 4 numeroj la altiĝo estas je 1,24 eŭroj. Tial estis akceptita plialtigi la abonkotizon por Francio kaj papera versio.

Nova abono-kotizo: 8 € por sendado per la poŝto
5 € por sendado per la reto

Parolado pri la aktualigo de la retpaĝaro.

La dissendolistoj funkcias.

Estontaj agadoj:

Vivu via strato en majo, junio, julio. Oni devus proponi ludojn por interigi la personojn, ĉefe junajn.

Bédéciné en Espace 110

Ungersheim kun ekologia foiro

Organizado de la Zamenhof festo en decembro je la 17a. Organizata de Colmar, verŝajne en loko de Wintzenheim.

Diversaĵoj:

Okazos IFEF-kunsido en Colmar la 26an de februaro por prepari la IFEF-kongreson en 2017 en Colmar.

Andreo fermis la kunvenon je 20h00.

Dankon al Andreo pro alportita biero.

La sekretario

Yves Stutz

KOTIZOJ KAJ ABONOJ POR 2016-2018

La kotizo al Mulhouse-Esperanto inkluzivas sendon de nia loka bulteno Sud-Rejna Kuriero. La membreco estas rezervitaj al la departemento 68 kaj donas la rajton voĉdoni okaze de Membro-kunveno.

Ekster la departemento ankaŭ eblas aboni nian bultenon SRK sen membriĝo al nia asocio.

Jen ĉi-sube la kotizoj kaj la abonoj por la 3 venontaj jaroj.

Jaro	Reta versio (pdf)	Papera versio	Kolora ekzemplero
2016	5 eŭroj	8 eŭroj	15 eŭroj
2017	5 eŭroj	8 eŭroj	15 eŭroj
2018	5 eŭroj	8 eŭroj	15 eŭroj

Eblas pagi per ĝiro al Mulhouse-Esperanto CCP 19684 F Strasbourg aŭ par ĉeko al André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM

Membroj de Esperanto-Societo Basel ne estas koncernataj per tiuj tarifoj.

Donaco fare de Lucien Hodapp

Nia grupo estis informita pri la nova vivo-situacio de nia samideano kaj membro Lucien Hodapp. La 19a de julio 2015 subite forpasis lia edzino. Post klopodoj kun helpo de sia filo, li sukcesis translokiĝi al la emeritejo de Dannemarie. Tie li fakte disponas nur pri persona ĉambro, sed ĝuas agrablan etoson sine de la emeritejo.

Poste li informis al Maria Fournier, kiu loĝas en la proksimeco, ke li deziras transdoni al nia grupo sian stokon de Esperanto-libroj. Maria transprenis la librojn sed ankaŭ proponis inviti lin kaj kejkajn membrojn por komuna manĝo. Ni varme dankis al Lucien Hodapp.

Ni decidis ke tiuj libroj estu metitaj je dispono de niaj membroj, mi aldonis ilin al nia biblioteko, konsultebla en nia retejo:

<http://mulhouse.esperanto.free.fr>

Jen ĉi-sube la liston de tiuj libroj.

Titolo	Aŭtoro	Nombro da paĝoj
Amo kaj Morto en Balio	BAUM Vicki	420
Faktoj kaj Fantazioj	BOULTON Marjorie	430
La Grafo de Monte Kristo T1	DUMAS Alexandre	590
La Grafo de Monte Kristo T2	DUMAS Alexandre	590
El la Vivo de Netaŭgulo	VON EICHENDORFF Joseph	140
La Granda Meaulnes	FOURNIER Alain	220
Vagabondo kaj Sinjorino	KLOEPFFER Walther	204
De villaĝo al ĉefurbo	KOFFI Gbeglo	32
Rande de l'Prudento	KRLEJA Miroslav	240
Ili Vivis sur la Tero	ROBINEAU M. B.	240
Gerda Malaperis	PIRON Claude	50

Titolo	Aŭtoro	Numero da paĝoj
Tio, kion mi kredas	ROSTAND Jean	40
Nokta Flugo	St EXUPERY Antoine	85
Malsata Ŝtono	TAGORER.	125
Tiu Toskana Septembro	TAVANTI- ERTL	137
Verkoj de	VERDA MAJO	500
Por la Praktikantoj		85
ABC-Gramatiko de Esperanto	De VLEMINCK-Van DAMME	240
Krestomatio	ZAMENHOF	472
Vojaĝo en Esperanto-Lando	VOLKER Boris	280
PIV Plena Ilustrita Vortaro	1987	1303
Esperanto Metodo 12	UFE	80
Ce qu'il faut savoir de l'Espéranto	Grammaire	70
Kiel diri	LENTAIGNE	135
Cours rationnel et complet d'Espéranto	1938	230
Paŝoj al plena posedo	AULD William	230
Poŝamiko	EDUKADO NET	40
Vienaj legendoj	IEM WIEN	40
Esperanto Tournures Idiomaticque	Cahier	52
100 Jaroj da kantado en Eo	HAVES Sylla	207
Kune ni kantis	UK en TAMPEREO 80-a	40

Lucien Hodapp sendis al mi ĉi-tiun leteron, per kiu li rakontas, kiom draste ŝanĝiĝis lia vivo kaj kia ĝi estas en la emeritejo de Dannemarie. Lia letero montras konkretajn situaciojn sed estas ankaŭ tute emocio-plena.

Teksto 1

Homo proponas sed Dio disponas

Vi verŝajne aŭdis tiun proverbon, por alimaniere diri, ke iuj planoj ne realiĝos kaj estos anstataŭigitaj pro neantaŭvideblaj situacioj. Tio ĵus okazis al mi. Efektive, kiu povus imagi antaŭ ses monatoj, (julio 2015) ke nun mi estos kun vi?

Ĉio komenciĝis lastan aprilon, kiam mi iris al la hospitalo de Altkirch por kokso-operacio. Tiu operaclo estis planita jam delonge. Sed ne estis planita, ke iom da tempo antaŭ ol mi iris al la hospitalo mia edzino havos apopleksion kaj estos en-hospitaligita. Mi transiras rapide la semajnojn, kiuj sekvis kaj dum kiuj ŝi revenis al sia hejmo; ŝi ricevis hejmajn flegadojn. Recidivo denove kondukis ŝin al hospitalo, kie ŝia sanstato daŭre malboniĝis ĝis la 19an de julio, la dato de ŝia morto.

Tial post mia konvalesko mi revenis al malplena domo, kie mi ekspertis, ke necesas mem zorgi por prepari la manĝojn, la lavaĵojn, ktp. La morto de mia edzino akriĝis mian vivoŝanĝon. Kiam mi alportis tiun novaĵon al la persono respondeca pri akcepto en la maljunulejo, kie ni jam ambaŭ estis sur atendo-listo, tiam oni informis al mi, ke ĵus liberiĝis ĉambro en la antaŭa nokto. Mia filo Marc, kiu akompanis min, diris, "tio estas miraklo!". Tiel mi troviĝas nun inter vi, loĝanto de la emeritejo, ekde la 30a de julio.

Paĝo de mia vivo turniĝis, nova vivo komenciĝis. La ŝanĝo estas drasta, paro, kiu vivis en sia propra domo en Chavannes kaj nun mia vivo sola en mia ĉambro. Sola? Ho ne! Ekzistas multe da homoj ĉirkaŭ mi, tre simpatiaj homoj. Miriĝas min la afableco de la personaro, precipe la junuloj, kaj mi gratulas ilin pro la elekto de ilia belega laboro: helpi homojn kun handikapo. Pli ol laboro, ĝi estas alvoko!

Mi estis tro okupata pro ĉiuj formalajoj post la morto de edzino kaj pro ĉiuj necesaj klopodoj por trovi aĉetanton por la domo de Chavannes, kiun mi vendas. Ĉu mi ne jam diris al vi, ke paĝo estas nun turnita? Do, kia estos nun mia vivo ĉi tie? Mi volas esti helpema kaj danki al interesataj personoj per kelkaj miaj kapabloj, kiuj restas al mi, ekzemple rilate al muziko. Aŭ simple partopreni la vivon de la loĝantoj. Mia malsano (Parkinson) ne malhelpas meti min je ilia dispono. Ĉiu ĉi-tie havas handikapon. Mi kutimis diri; "Estas pli bone perdi siajn kruojn ol la kapon" Fakte tio okazas nun al mi. Do mi ne plendos pri mia sorto!

Amikino mia, direktorino de emeritejo, kiel ĉi-tiu, diris al mi ke ŝi neniam konis pensionulojn tiom feliĉajn kiel mi estas ĉi-tie. Ĉu mi estus escepto? Ĉar mi elektis veni kaj loĝi ĉi-tie kaj pro tio mi estas feliĉa. Mi ŝatas la komforton de mia ĉambro, la kvaliton de la mebloj kaj de la ekipoj. Kio ankaŭ gravas: havi helpon kiam necesas.

Grandan dankon al vi ĉiuj: flegistinoj, help-flegistinoj kaj servistaro, pro via disponebleco kaj pro via rideto, kiu varmigas la koron.

Lucien Hodapp, septembro 2015

10-a Mediteranea Esperanto-Semajno en Les Issambres 5. 3.-12. 3. 2016

Okazis en la sud-franca feriejo “Vacanciel”. En bela hotelo “Val d’Esquières” ĉirkaŭ cent personoj el dek landoj venis ĝui agrablan etoson ĉe la marbordo de la Mediteraneo. La eventon ĉeestis ankaŭ du-jaraĝa aminda knabineto Marietta.

La ĉeforganizantinoj Christine Grassaguel kaj Monique Prezioso helpata de siaj familianoj kaj de aliaj esperantistoj pretigis por ni allogan programon ĉe la Lazura Marbordo en *Les Issambres*. Dum la interkona vespero ni konatiĝis kun la instruantoj de la divers-nivelaj Esperanto-kursoj.

Ĉiumatene la tago komenciĝis per tri Esperanto-kursoj, dum tri horoj. La posttagmeza instruado, antaŭ la vespermanĝo, daŭris unu horon. La komentantojn instruis Jindřiška Drahotová el Ĉeĥio, kiun asistis por spertiĝi en la instruado ŝia samlandanino Jaroslava Malá. Pli spertajn esperantistojn sprite gvidis kaj



En Roquebrunnès, ĉe ĉokolado-foiro: turnigado de pico



Marto 2016 Les Issambres

multe paroligis Gražina Opulskiene el Litovio. Por la bonaj parolantoj Miguel Gutiérrez Adúriz el Hispanio prezentis mikronovelojn, montris al ili kiel publikigi filmojn en la reto kaj ankaŭ kantigis ilin. Ĉiuj partoprenantoj de la kursoj certe plibonigis sian lingvo-nivelon dum tiu unusemajna studado.

Dum la matena paŭzo la partoprenantoj teumis aŭ kafumis kaj interbabilis. Je la dispono estis ampleksa libroservo prizorgata de gesinjoroj Schneider kaj Claudie Demongeot. Pluraj ĉeestantoj aĉetis E-librojn kaj aliajn esperantaĵojn. Intereson vekis ankaŭ miaj fotoalbumoj kun raportoj pri diversaj Esperanto-aranĝoj.

Post la bongusta tagmanĝo bela vetero favoris promenadojn en la ĉirkaŭaĵo kaj ekskursojn al pli foraj lokoj. Vespere okazis diversaj prelegoj kaj bildprezentoj.

Dimanĉe kelkaj el ni vizitis la urbon *Fréjus* dum aliaj ĝuis ĉokoladan feston en la apuda urbeto *Roquebrune-sur-Argens*. Tie ni admiris grandegan ĉokolad-tabulon. Ĝi pezis 220 kg, estis du metrojn longa kaj dek centimetrojn dika. Poste oni dispecigis ĝin kaj disdonis al la vizitantoj. Vespere ni spektis la teatraĵon “La Viro-Semo”, kiu estis ankaŭ prezentita dum la UK en Lillo.



Ekskurso al fuorto de Brégançon

Marde okazis ekskurso al fuorto de *Brégançon*. Sur la insuleto, impona roko kaj sur ĝi majesta fortikaĵo fariĝis ŝtata rezidejo de la francaj prezidentoj. La nuntempa prezidento François Hollande decidis malfermi ĝin al la publiko en la jaro 2012. Eblas viziti ĝin de majo ĝis septembro. Multaj interesiĝas pri tiu fama loko kaj ĉiujare ĝi estas amase vizitata.

En la hotelo, kie okazis la aranĝo ni tre bonguste kaj abunde manĝis. Dum



Teatraĵo: La vira semo



Montara migrado proksime de Saint-Raphaël

libera tempo iuj kartludis, aliaj lernis danci, legis aŭ komputilis. Eblis ankaŭ partopreni en distraj aktivaĵoj kaj aliaj proponoj de la hotelo mem. Kelkaj el ni profitis tion. Ni povis partopreni en diversaj vortludoj, danco, manlaboroj, enigmoj, gestuno, skrablo, karaokeo-kantado ktp.

Kelkfoje dum la semajno en la hotelo instaliĝis vendistoj, kiuj proponis al la gastoj varojn por aĉeti. Inter ili troviĝis diversaj memoraĵoj, parfumoj, artikloj el lavendo, sapoj, mantukoj, juveloj, mansakoj, koltukoj varia sortimento da infuzaĵoj, teoj, mieloj kaj marmeladoj ktp.

Pri nia evento aperis en la loka ĵurnalo “*Var-matin*” favora artikolo kun komuna foto de la partoprenantoj. La titolo estis: “*Communication sans frontières aux Issambres*” (Komunikado sen baroj en Issambres).

Merkrede ni trarigardis la arkeologian muzeon en la urbo *St. Raphaël* kaj en la kultura domo estis instalita bild-ekspozicio, kies temo estis kvadratoj. Tie ni povis admiri ankaŭ fotojn de Pascal Vilain. Li loĝas en tiu regiono kaj parolis al ni pri sia fotad-hobio.

De Gražina Opulskiene ni eksciis pri la rilato de nia Majstro Zamenhof kun Litovio. Pri neceso de Esperanto en Eŭropo kaj pri la projekto TUJ



Proksime de Fuorto de Brégançon insuleto de Luksemburgio



Sukcesa instruado de Gražina Opulskiene

parolis Thierry Saladin. De Guy Perrin ni akiris informojn pri la unua irana kongreso en Teherano, en kiu li partoprenis. Li ankaŭ montris bildojn kaj per ili ni ekkonis la ĉefurbon kaj spektis aliajn belaĵojn de la lando. Same interesa estis bildprezento pri Ĉilio, kiun prezentis Jean-François Coussineau. Aldonajn bildojn pri la Pasko-insulo komentis Christine Grassaguel. Dum la lasta adiaŭa vespero la organizantoj pretigis tombolon en kiu ĉiu gajnis ion. Sur scenejo la partoprenantoj distris nin per kantoj, skeĉoj kaj aliaj amuzaj eroj. Ĉe la fino estis pridonacitaj la kursgvidantoj kaj la organizantoj. Al ĉiuj plaĉis akordiona muziko kaj gaja dancado daŭris ĝis la noktomezo.



La vespera programo iomete malfruas



La arango estis sukcesa, bela vetero kontribuis al la bona humoro de la partoprenatoj kaj ĉiuj bonfartis. Ni ĝuis agrablan semajnon en gaja etoso kaj promesis reveni venontjare al la sama, alloga loko ĉe la Bordo Lazura.

Koran dankon al la organizantoj pro ilia strebo kaj bona laboro.



Liba Gabalda

Vojaĝo al Irano fare de Roberto Kueny Amikeco per Esperanto

Mi ĵus revenis, la 16 an de aprilo 2016, de vojaĝo al Irano, kaj deziras al vi raporti pri la restado en tiu lando.

En la lasta bulteno “La Informilo” vi jam povis legi la raporton de nia samideano Yves NICOLAS el la urbo Caen (Normandio), kiu vizitis la landon kun sia filino last-septembre 2015.

Mi ne deziras ripeti pri aferoj kiujn li bone priskribis.

Cetere nia samideano Bruno HENRY jam vizitis la landon kaj plurfoje oni raportis en la lastaj numeroj de “La Informilo”.

Konkerne mian sperton pri vizitado al la lando, mi aldonos jenon:

Jam de dek jaroj mi ekkonis esperantiston el Irano, kiu nomiĝas Hamid SHAERI, precize dum Universala Kongreso en Rotterdamo en 2005, dum matenmanĝo en la sama hotelo. Iĝis amikeco inter ni.

Li jam vizitis min en 2009 venante al Eŭropo por la UK de Bjalistoko. Li invitis min al sia lando. Decidite: marto 2010; sed fine de oktobro 2009 okazis “ia revolucio” en Teherano. Mia edzino ne ŝatis ke mi iru la landon dum la “eventoj”!

En 2015 Hamid, mia irana amiko, ĉeestis la UK-on de Lille, kaj feris poste en mia hejmo. Re-invitado. Decidite: aprilo 2016, kiam la veter-temperaturo ankoraŭ mildas kaj kiam eblas la gvatado de mia edzino dum du semajnoj per niaj geinfanoj.

Mi alvenis al Tehrano la 2 an de aprilo akceptita de Hamid kaj lia frato Mahdi.

(Ili loĝas en Karaj, urbo je 50 km de la ĉefurbo).

La lando estas vasta por viziti la vidindaĵojn! Decidite “ke oni prenu min” por vizito al Isphahano kaj Shiraz post unu tago de vizito al la montaroj inter Teherano kaj la “Kaspia maro”. Isphahano (Esfahan en perslingvo) estas for je 500 km de Tehrano kaj Shiraz pliaj 500 km!



Do per privata veturilo, Mahdi kaj Hamid kaptis Roberto-n por rondiro je 2500 km dum unu semajno, kaj tiel mi malkovris la juvelojn Isphahano (Esfahan) kaj Shiraz, iliaj "Bazaroj" (malnovaj je kvin cent jaroj), kaj la detruita Persepolis-urbo. Survoje ni vizitis ankaŭ la belegan "ruĝan" vilaĝon Abyaneh nestitan inter ruĝaj montoj.

Dum la dua semajno la du fratoj ankoraŭ kaptis min por vizito al aliaj vidinda-



ĵoj! Por mi, nekredebla sperto de la ĉiutaga vivo en Mez-Orienta lando, kiu estas Islama Respubliko de la Revolucio de 1979.

Marde vespere, la 12-an de aprilo, mi ekkonatiĝis kun la Esperanto-grupo en la sidejo de Teherano kaj por mia plej granda plezuro la vic-prezidanto donacis al mi ekzempleron de originalaj poem-verkoj en Esperanto: "Versoj de Persoj".

Dum tiu vespera renkontiĝo mi malkovris la belan verkaron de Omar Khayyam, kiu tronis sur la bretaro de la sidejo.

Imagu libron de kompilaĵo de tradukoj al 30 lingvoj de la kvar-versoj de Khayyam, inter ili 210 en Esperanto, tradukitaj de Waringhien! Bela verkaro, kiun mi ŝatus akiri des pli, ke la ekzemplero ne plu estas reeldonita de post la Revolucio. . . .

. . . . kiam membro de la grupo trovis vendeblan specimenon ĉe privatulo en la urbo Karaj mem, kie loĝas Hamid!

Akiro de la trezoro (por mi) la venontan tagon. Kia bonŝanco!

Mi aĉetis, kompreneble, ankaŭ la verkojn de du konataj poem-verkistoj: Hafez Shirazi: "Amo, Amanto, Amantino" (tradukita en la francan!!) kaj tiuj kvarversoj de Omar Khayyam, en kvar lingvoj (nur).

En la familio de Hamid en Karaj mi frandis la tradiciajn kuiradojn preparitajn de la patrino kaj onklino. . . . kun trinkaĵo pli dolĉa!

Mi vere trapasis mirindan agrablan restadon dum du semajnoj ĝis la 16-a de aprilo, ĉar bonŝanco estis, ke la vetero belis kaj ĉefe, ke la homoj estis tre, tre afablaj, unue la parencaro de Hamid, de kiu mi estis lulita, sed ankaŭ ĉiuj enloĝantoj de la lando, kiuj ofte volis inviti min al manĝo en sia hejmo! Nekredeble! Ĉu ĉar mi estas franco? Aŭ pro mia aspekto, kun mia barbo, kvazaŭ mi estus la filo de la "Granda Gvidanto de la Revolucio"?

Pri aliaj nekutimaĵoj? Mirigis min la larĝeco de la aŭtoŝoseoj (trivojaj!) sur preskaŭ la distanco al Shiraz tra la dezerto.

Ce la eniro de grandaj urboj la ŝoseoj iris kvarvojaj, do imagu la ŝtop-trafikon de veturiloj je "ok" vicoj (!), . . . kaj tusado de Roberto pro polucio!

Jen la destino de la hodiaŭaj grandegaj urboj. 20 milionoj da enloĝantoj en Teherano, tiom da veturiloj... (multaj Peugeot kaj Renault, kiel jam skribis Yves NICOLAS).



Mirinda preparado kaj kuirado de la panoj, kvar diversaj manieroj, neimagebla por mi! Jes ja mi spertis multajn nekutimaĵojn estante ĉiam gvidita de privatuloj.

Mi havis la eksterordinaran ŝancon enriri la Grandan Moskeon de Shiraz dum la "Granda Vendreda Preĝo". Ne forgesbla!

Mi estis impresita pri la "laŭvola" ŝoforado de la Irananoj kaj la "laŭvolaj" hodiaŭaj konstruaĵoj, kvankam la praaj malnovaj domegoj kaj palacoj estas tre bone konservitaj.

Kion diri pri la beleco de la fraŭlinoj kaj virinoj de la lando: bele ŝminkitaj, ruĝaj lipoj, kaj belaj nigre ŝminkitaj okulo-haroj kaj brovoj, kun malhelaj pupiloj sub deviga vualo.

Ĉu ili estas pli belegaj sub la vualo? Tiom kiom la "Virgulino", patrino de Kristo?

Mi kunportis "nur kelkajn" kilogramojn da pistaĉoj (inter la tunoj en la magazenoj) kaj gramoj da safrano, kiu surloke kolorigas la ĉiutagan rizon. Sen aludi pri la tunoj da miel-dolĉaĵoj!

La Irananoj trinkas ofte teon ĉiam sukeritan, dum la tago. Kia memoraĵo por mi ĉar ofte mi spertis nekutimaĵojn, ne imageblan!

Mi deziras ree danki miajn gastigantojn pro ilia afableco. Mirindan belan vojaĝon mi travivis en Irano dank'al amikeco inter esperantistoj.

Cetere Hamid bone scipovas paroli la francan! Mi devas paroli la anglan kun la fratoj de mia amiko, do pena miksaĵo inter la tri lingvoj, se ne ankoraŭ la germana kun iu amikino, kiu feris "hejme" sed laboras en Germanio kaj nur parolas la persan, la kurdan kaj la turkan!

Roberto.

**79a Regiona Staĝo de Esperanto
la 22/23/24ajn de aprilo 2016
en Centre de Loisirs
36 avenue de la Chartreuse,
FR-54510 ART SUR MEURTHER**

La Esperanto-grupo de Nancio trovis taŭgan lokon por la ĉi-jara printempa staĝo de Esperanto-France-Est. Ferio-centro en ART SUR MEURTHER, iom for de Nancy. Je la dispono de la staĝanoj estis 3 konstruaĵoj, domo kun 2 aŭ 3-litaj dormo-ĉambroj, alia domo por la diversaj manĝoj kaj tria domo kun diversaj salonoj por la kulturaj kaj distraj programeroj. Tie estis ankaŭ instalita la Libro-servo.



Venis al tiu staĝo preskaŭ 50 partoprenantoj el Francio kaj Germanio, sed ankaŭ el Luksemburgio, Nederlando, Svedio. Tio kreis internacian etoson.

Vendrede vespere estis jam proponita nokta vizito al la urbo Nancio, kie oni jam preparas ekspozicion por la jaro 2025.



Sabate matene eblis viziti en Harau-court la muzeon pri salo, nomata "domo de la salo". La ĉeestantoj ricevis multajn klarigojn pri la ekesto de salo en tiu regiono. Fakte antaŭ proksimume 220 milionoj da jaroj, la Germana maro kovris granda parton de orienta Francio, kaj apudajn landajn. La marsalo sekigante deponis tavolojn da salo. En antikva tempo oni trovis salofontojn. Nur en la industria periodo oni komencis eksploati la salon. Tiel ni ricevis multajn informojn pri la evoluo laŭlonge de la jarcentoj kaj laŭ la teknikaj progresoj ĝis ekspluatado de salminejoj.



Nun 10% estas uzata por nutraĵo kaj 90% por la stratoj vintre.



Sabate posttagmeze tut-unue Jean-Luc Thibias, prizorganto de la Libro-servo prezentis al la publiko la novajn librojn, kiujn la Libro-servo laste akiris. Nur poste komenciĝis la kursoj kaj la prelego.

Catherine Hel gvidis la kurson de komencantoj, Edmond Ludwig gvidis konversacian kurson por la progresantoj.

Istvan Ertl prelegis pri la Esperanto-literaturo. Li proponis tekstojn de diversaj aŭtoroj, tradukoj kaj originalaj verkoj. Li

emfazis la specifajn stilojn, kiujn eblas ĝui en Esperanto. Li eĉ proponis legadon de iuj tekstoj por tiel montri kaj sentigi la stilon al la aŭskultantoj. Kiom riĉa estas la esprim-maniero kaj stilo de iuj aŭtoroj en Esperanto, vere ĝuinda.



Li proponis inter-alie

Maskerado ĉirkaŭ la morto de Tivadar Soros

Poemon de Utnao de Abel Montagut el Poezio originala

Poemaron de William AULD BONAN MATENON, MAJSTRO (jen ekstrakto)

Bonan matenon, Majstro! Sidiĝu, mi petas.
Kiel vi fartas post kvindekjara malvivo?
Bonvolu fumi. Nu, vi certe enketas
pri la Movado kaj l'nuna perspektivo?
Nu, ni laboras. Sed - vi scias - la homoj
estas inertaj, altaj estas la baroj,
malfavoras l'epoko: militoj pogromoj
minacas; nin ignoras la registaroj.
Jes, jes, en via tempo, estis simile;
vi tamen ne povas kompreni, kio nin frontas -
atingi l'orelojn estas malfacile,
kaj kiam la homoj mokas nin, ni hontas.
Nu jes, vi multe oferis. Ni mem kelkfoje
donacis kelkan monon, sed ni malriĉas.
Ne pensu, ke ni nenionfaradas survoje!



En la vespera programo okazis la koncerto de Nataŝa Bertse. Ŝi venis speciale de Svedio kun sia filo Eric.

Ambaŭ gitar-ludis kaj Nataŝa kantis belajn melodiojn, verŝajne iom nostalgiajn pri la tempo de "Esperantotendaroj", kiuj kunigis multajn gejunulojn en tiama Latvio. Sed ŝiaj kantoj estas agrablaj, plenaj je romantikeco kaj sopiro pri pasinta tempo, kiam la koroj sopiris, esperis pri amikeco kaj amo. La aŭskultantoj varme aplaudis ŝin kaj ŝian filon.

Post la koncerto malmutaj sopiris pri tuja enlitiĝo, feliĉe la organizantoj ankaŭ planis en apuda salono knajpon kun biero, kaj aliaj trinkaĵoj.

Dimanĉe matene denove funkciis la prelegoj kaj la kursoj.



Tamen post la paŭzo, intervenis alia prelegantino, nome Catherine Kremer.

Ŝia temo rilatis al la sekvoj de la unua mondmilito okazinta antaŭ 100 jaroj. Kiel la loĝantoj deziris rememori kaj rememorigi tiujn terurajn kaj tragikajn eventojn.

Tial ŝi montris fotojn de diversaj monumentoj kaj konstruaĵoj por

honorigi la mortintojn. Mirinde, ŝi ankaŭ montris neoficialajn monumentojn kontraŭ la milito. Ŝiaj klarigoj estis kelkfoje patosaj, sed trafaj.

Inge Simone transdonis al Jean-Luc ekzempleron de la revuo *Monato*, en kiu aperis plena artikolo pri Nancio. Krome la grupo de Bavelo informis pri diversaj planitaj eventoj en Messkirch kaj en Rastatt.

(informoj en ĉi-tiu numero)





Mi petis al Irena, mia nova lernantino iom raporti pri sia unua partopreno en tiu staĝo. Ŝi klopodis, unue en la franca, poste per tradukado al Esperanto. Tamen tiu traduko ja bezonis mian intervenon, se ne, ŝi konfesas:

"viaj ridoj aŭdiĝus je fora distanco".

Andreo kun multaj dankoj kaj gratuloj al Irena!!!

Miaj impresoj pri la staĝo apud Nancio!

Mi nomiĝas Irena. Ĵus-alveninta al Esperanto-kurso (de januaro 2016), mi ricevis inviton por la regiona staĝo de Nancio la 22/23/24aj de aprilo. Pro scivolemo mi enskribiĝis. Mi ĵus atingis mian sesan lecionon.

Tie, ĉe la akcept-centro, ĉie oni parolis en Esperanto. . . ĉie! Ĉe vesper-manĝotablo mi zorgis esprimiĝi per simplaj frazoj, nepre pro mia limigita vortprovizo. Kaj ĉe pli ellaboritaj aŭ rapidaj diskutoj, mi kaptis nur kelkajn vortojn, jen kaj jen. . . alivorte mi kvazaŭ ŝvebis! Kaj la helpoj de interpretisto bonvenis.

La sekvo de la programo: vizito al Nancio "dum-nokte"! Malvarmis, sed la marŝado varmigis nin. Jen, la kanalo de Marno al Rejno. . . Jean-Luc gvidis nin tra la stratetoj kaj komentis. . . la fama placo Stanislas. . . la luksaj konstruaĵoj de glora pasinteco. . . kaj jen la amuza parto kun la granda sfero prezentanta la kandidatecon de Francio por la Universala Ekspozicio en 2025. . . kaj nun la malnova urbo. . . Min surprizis konstati la animadon, kiu regis ĉi-tie. Mi taksis min preskaŭ en vespera gapvago kvazaŭ en famaj kvartaloj en Parizo.



Nia itinero pasis tra granda brua kaj ege kolora foireja festo, kie multaj karuseloj ekvokas por pluraj inter ni rememorojn el junaĝo, dum aliajn atrakciojn eblis ankoraŭ malkovri, eble kun certaj ektimoj. Sentemuloj prefere evitu ilin! Poste, ekestis silento, rapid-paŝe ni revenis, pluvetis kaj surprize nin kaptis subita pluvego sed ĝustatempe ni alvenis al la veturiloj.

Sabate matene, aliaj amikoj alvenis por gvidata vizito al "la Maison du Sel" en Harancourt. Tre interesa, sed tre longa, ĉar la franca prezentado estis tradukita al Esperanto por niaj eksterlandaj geamikoj kaj laceco ekaperis. La grupo nombris kvindekda partoprenantoj venintaj ankaŭ el najbaraj landoj. Multaj el ili havis jam okazojn renkontiĝi kaj nun retroviĝas en komuna ĝoj-amikeco sen landlimo.

Inter la proponitaj programeroj, mi elektis la kurson por komencantoj, gvidatan

de Catherine Hel. Alvenis de Nancio Jean, eĉ pli nova ol mi, ĉar estis lia unua leciono. Estis por mi la oportuneco por malgranda reviziado, sed tamen nevana. La lernado estis samtempe lerniga kaj malstreĉa, kaj la amikoj de la apuda ĉambro atestis pri miaj ekridoj.

Distra vespero: komplika duopo de gitaroj kun Nataŝa Bertse kaj ŝia filo el Svedio. Tra varia repertuaro de dolĉaj, gajaj aŭ ritmaj kanzonoj, el kiuj unu en la franca, ŝi montris la vastecon de sia talento kaj plezurigis la aŭskultantaron. Sed la dormado en tiu nokto estis tie malfacila ĉar, por iuj, la festo daŭris malfrue, kun muziko proksime al mia ĉambro, multe malpli harmonia. Domaĝe!

Sed malgraŭ tio, en tiu sama mateno la du komencantoj ĉeestis ĝoj-humore por persisti en la daŭrigado de la lernado, komencita en la antaŭa tago. Poste, lasta manĝo kunvenigis ĉiujn en vivema amikeca etoso kun ridetoj sur la vizaĝoj. Tuj mi provis mian novan vorto-provizon ĵus akiritan. Ekridoj! Jes. . . sed ankaŭ komplimentoj, kiuj trankviligis min, ke mi estas sur la vojo al progreso!

Ĝis la revido! Kaj dankon al ĉiuj !

"Vivu via strato" dum 10 dimanĉoj en Mulhouse

Yves Stutz refoje proponas al vi partopreni en tiu evento, dum 10 dimanĉoj de la 29a de majo ĝis la 31a de julio, ĉiun dimanĉon de la 10a30 ĝis la 15a. La tuto okazas laŭ la bordo de la rivero ILL, trans la ponto proksime de la kampadejo de Mulhouse.

Tie estas metita je nia dispono tablo kaj seĝoj. Eblas informi kaj babilu kun la preterpasantoj pri Esperanto kaj krei kontaktojn. Tamen la principo estas, nenion vendi, nenion aĉeti. Ĉio estu senpaga. Tial se vi deziras surloke manĝi, prefere vi kunportu viajn piknikaĵojn kaj ĝuu la naturon kaj la printempan veteron.

Plej oportune estas parki apud la enirejo de la kampadejo kaj transiri piede sur la ponto al la alia flanko.

Refoje ni organizos la deĵoradon per nia dissendolisto.



Verdaj fadenoj por amike babili en Esperanto

Niaj verdaj fadenoj okazas alterne en Mulhouse kaj en Saint-Louis. Ĝuste tie Bertrand Wick sukcesis trovi novan restoracion kun aparta salono, multe pli trankvila ol en restoracio "de la Poste".

Temas pri "Hotel-Restaurant Porte de France", 94 avenue de Bâle, Saint-Louis, tute proksima al la land-limo al Svislando.



Hotel-Restaurant Porte de France

Lunde la 25an de aprilo nia grupo jam tie kunvenis unuafoje. Ni ĝuis apartan salonon (kiu povus akcepti eble tridekon da personoj), tute trankvila, for de la ceteraj klientoj.

Bedaŭrinde malgraŭ la proksimeco al Bazelo, neniu el la bazela grupo povis veni en tiu vespero.



Jen la venontaj datoj por niaj verdaj fadenoj

- ◆ 30an de majo en Mulhouse en la kafejo Le printemps, rue du printemps.
- ◆ 27an de junio en la restoracio "Hotel-Restaurant Porte de France", 94 avenue de Bâle, Saint-Louis.



Vi estas varme invitataj ilin partopreni por havi la okazon aŭdi Esperanton kaj tute amike babili kun la partoprenantoj.

Ni jam kutimas poste kune vespermanĝi, laŭ la proponitaj menuoj.

Somera programo 2016: **resumo**

Programme d'été 2016 : [résumé](#)



junio-12/17 : La Luaro laŭ [la vortoj](#). Gloraj verkistoj kaj la kasteloj de la Luaro. **Kultura kaj turisma semajno** kun *Catherine Kremer* - Aliĝlimo proksima !

12-17 juin : La Loire au fil des mots. Les illustres écrivains et les châteaux de la Loire. Semaine culturelle et touristique - date limite d'inscription proche !

julio-04/15 : Dektaga kurso pri la **esprimo de la tempo** en Esperanto kun *Christian Rivière*. Komparstudo de la tempo-problemo inter Esperanto kaj la franca

4-15 juillet : Cours de 10 jours sur l'expression du temps en espéranto avec Christian Rivière. Étude comparative du problème du temps entre les 2 langues

aŭgusto-06/13 : **SOMERAS**, la Esperanto-**studad**-semajno kun *Mikaelo Bronštejn, Tim Morley, Przemek Wierzbowski*

6-13 août : SOMERAS, la semaine d'étude de l'espéranto avec Christophe Chazarein, Marion Quenut

aŭgusto-21/28 : Festa semajno por **infanoj**, adoleskantoj kaj **familioj**, por prepari la novan lernejon kun *Elisabeth Barbay, Ansoft Markov*,

21-28 août : Semaine Festive pour enfants, ados et familles, pour bien préparer la rentrée avecJean-Luc Kristos, Nicky Janssen

BONVENON en la franca kastelo Greziljono
BIENVENUE au château de Grésillon

Poŝtadreso : Maison Culturelle de l'Espéranto, Grésillon, 49150 BAUGÉ-EN-ANJOU

Telefono : +33-2.41.89.10.34

Retpoŝto kastelogresillon.org


Retejo : www.gresillon.org aŭ nur gresillon.org

AMIKA TAGO en Freiburg

la Frajburgaj esperantistoj kore invitas vin al **AMIKA TAGO en Freiburg** je la **25a de junio** 2016

Ni proponas komunan ekskurson al monto Schauinsland per publika transporto.

- 10a15 ni renkontiĝas en la stacidomo, centra halo, apud la inform-giĉeto
- 11a alveno ĉe "Talstation" (baza stacio de la telfero) kaj ŝvebado supren al "Bergstation" (telfero kostas 12 € supren + suben, en grupo iomete malpli)
- promenado al la montopinto, kuraĝuloj povas grimpi sur la turon (tre rekomendite!). Ĉe klara vetero indas uzi binoklon, ne forgesu.
- Komuna pikniko ĉe la pinto. **Atentu:** Manĝaĵoj kaj trinkaĵoj ne estas aĉeteblaj surloke, (ĉe la telfera stacio estas kiosko por etaj provizoj). Tial preferas ĉion prizorgi antaŭ la forveturado.
- poste, reveno al Freiburg (ĉ. 15a) kaj vizito al "Zinnfigurenklause" (eta muzeo en Schwabentor pri stano-figuroj, ĉefe el la tempo de la "kampanaraj militoj" 1525.



<http://www.zinnfigurenklause-freiburg.de/fr/>

- fino de la "oficiala" programo: ĉ. 18a
- *Se estas malagrabla vetero (pluvo, ŝtormo, neĝo ...) ni havos belan anstataŭan programon kun muzeoj.*

Ni kore bonvenigas vin, veni kaj ĝui la tagon kun ni la Frajburganoj

Por atingi la stacidomon de Freiburg estos oportune uzi la regionan trajnon ekde Müllheim al Freiburg.

Starto je la 9a06 alveno je la 9a34
aŭ 9a23 alveno je la 9a44

Eblus tiam aĉeti 5-personan bileton por favor-koste vojaĝi.

Aranĝoj de Bavelo en 2016


Esperanto-tago Baden-Virtemberga en 4a junio en Messkirch

Centra aranĝo estas la membrokunveno de BAVELO. Sed krome atendas vin tempovojaĝo en epokon sen saĝtelefonoj, kurento kaj maŝinoj: ni vizitos la eksperimentan arkeologiejon „Campus Galli”. Instigite de la projekto „Kastelo Guédelon” oni konstruas en Messkirch mezepokan karolingan klostron laŭ mezepokaj planoj trovitaj en St. Gallen.

La kunlaborantoj matene devas lasi siajn poŝtelefonojn, vesti kiel mez-epokano kaj praktiki metion kiel oni faris en la 9a jarcento.

Vizitantoj povas rondiri, rigardi la praktikatajn metiojn kaj paroli kun la tempovojaĝantoj.

Pliaj informoj ĉe / aligoj al Inge.Simon@esperanto.de kaj tre baldaŭ ĉe esperanto-bw.de



BAVELO-seminario 4a - 6a novembro en Rastatt

La tradicia BAVELO-seminario ĉi-jare okazos en Rastatt. La seminaria temo estos publika rilato - ni sukcesis gajni por tio Lu Wunsch-Rolshoven, kiu gvidas la gazetaran fakon ĉe GEA.

Ankaŭ la ekskursita programo estos riĉa kaj inspiro: La urbo-gvidadon akompanas korta damo, kiu konas la sekretojn de siaj majestoj.

Kvankam ni ne loĝos en la kastelo de Rastatt, ni tamen trovis tre komfortan seminariejon: la jam „klasika” tre komfortan klerigejon St. Bernhard, kie ni jam okazigis plurajn seminariojn.

Pliaj informoj ĉe / aligoj al Inge.Simon@esperanto.de kaj tre baldaŭ ĉe esperanto-bw.de



Nia Kalendaro 2016

<p>Majo</p> <p>2016</p>	<p>6 - 13 - 20 - 27</p> <p>29</p> <p>30</p>	<p>Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a ĝis la 16a30 aŭ de la 18a30 ĝis la 20a, laŭ interkonsento.</p> <p>Unua dimanĉo por "Vivu via strato" de la 10a30 ĝis la 12a30 en Mulhouse</p> <p>Verda fadeno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 21a en la kafejo Le Printemps: 7 rue du printemps Mulhouse.</p>
<p>Junio</p> <p>2016</p>	<p>3 - 10 - 17 - 24</p> <p>16</p> <p>25</p> <p>27</p>	<p>Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a ĝis la 16a30 aŭ de la 18a30 ĝis la 20a, laŭ interkonsento.</p> <p>Nia grupo Mulhouse-Esperanto proponos komunan manĝon en iu restoracio, laŭ proponoj kaj eble prefero iun ĵaŭdon vespere.</p> <p>La samideanoj de Frajburgo proponas amikan tagon ĉe Frajburgo. Per telfero atingi la monton Schauinsland. Pliaj informoj kaj horaroj aperas sur paĝo 25.</p> <p>Verda fadeno laŭ propono de Bertrand de la 19a ĝis la 21a en restoracio "Hotel-Restaurant Porte de France", 94 avenue de Bâle, Saint-Louis</p>

Sud-Rejna Kuriero aperas kvaronjare. Ĝin redaktas por Esperanto-Societo Basel: Hanspeter SENN, Paradieshofstr. 164, CH-4054 Basel kaj por Mulhouse-Esperanto: André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, FR-68390 Baldersheim. Ĝin eldonas Mulhouse-Esperanto.



Col du Bonhomme



Staço en Art sur Meurthe

